



50jara jubilea festo!

2-6a de majo 2018 en Cenon (33)

SATanoj kun siaj amikoj
en la kastelo de la Diablo!

Ĝenerala alvoko por kune jubilei

1968 - 2018



Ne nur sango fluos!

Laborista asocio
festas esperanton kaj
sian movadon! Kiun
peresperantan agadon?
Kiel sennaciece aktivi?



En la sama loko kie
SAT-Amikaro
kongresis jam en la
jaro 66 (*diable!*)
de la lasta jarcento

Etkoste!

Alloga programo
Engaĝigintaj prelegontoj
Originala turisma itinero
Ciu-tagaj koncertoj
Intersindikata tago
sociokritikemuloj rendevuas
kun artistoj



Veraj surprizoj!



Popolo ek! al...



ĜENERALA ASEMBLEO DE ESPERANTO-GIRONDE.
DIMANĈON la 8an de OKTOBRO 2017
je la 10a30
EN PESSAC

Cestas: Jean-Seb Brilleaud, Elvezio Canonica, Thérèse Cayatte, Janine Dumoulin, Yannick Dumoulin, Monique Dussenty, Martine Eldeboude, Bruno Ferré, Peio Labbé, Joël Lajus, Claudine Pomiro, Marcelo Redoulez, Morine Stride, Bernard Vidal

Senkulpigitaj: Aurora Lopez, Ge-Jagueneau, Ge-Sarlandie

Elvezio dankas al Jean-Seb pro la gastigado.

1/ Agadraporto (prezentita de Janine, sekretario)

Depost la lasta ĝenerala asembleo en Créon, la 6an de novembro 2016:

- Okazis 4 kunvenoj

- la 8an de januaro: reĝofesto, en Cenon
- la 12an de februaro: krespotago, en Créon
- la 4an de aprilo, en Cenon
- la 21an de majo, en Créon

- LEGI

Dum tiu jaro, la membroj de Esperanto-Gironde ricevis 3 numerojn de LEGI (149, 150, 151).

- Aliaj okazaĵoj

- Ni devis fronti malagrablegan okazaĵon, t.e. la forpaso de Ŝelin', okazinta la 25an de novembro 2016.
- Male ĝojigis nin tre agrabla okazaĵo la 6an de januaro: la geedziĝo de Jean-Seb kaj Annie.
- La kursoj daŭris ĉijare en la universitato, gvidataj de Elvezio kaj Jean-Seb. La 12an de aprilo estis la lasta kurso, kaj Espéranto-Gironde organizis festeton, en kiu partoprenis deko da studentoj kaj membroj.
- Estis parte starigita projekto por akcepti la kvaropon Kajto en Bordo; tio ne povis realiĝi, kaj la projekto estis prokrastita al 2018.
- Alia projekto estis plensukcese lanĉita: «Kiam naturo helpas praktiki Esperanton kaj reciproke», estigita de Marcelo.

- Estis kreita nova logotipo por Esperanto-Gironde kaj ankaŭ unu por LEGI.
- Same estis pridiskutata projekto pri T-ĉemizoj kun la logotipo de Esperanto-Gironde.
- De la 25a ĝis la 28a de majo, pluraj el la Kompanoj troviĝis en Parthenay por kunkantada renkontiĝo.
- Estis aprobita la ideo partopreni en la financado de la KD de FaMo: Brel en Esperanto.



La agadraporto estas unuanime aprobita.

2/ Financa bilanco (prezentita de Moline)

Nous avons enfin pu déposer la signature du président et de la trésorière à la poste de Créon. Cependant les relevés arrivent toujours chez Monique...

Les recettes ont été de 745€, qui s'ajoutent au solde positif de 2016: 532,15€, et les dépenses de 1077,46€

Il reste 199,69€ sur le compte chèques.

Les frais bancaires (frais de tenue de compte) s'élèvent à 26,50€

Les dépenses comportent aussi les frais d'imprimerie de LEGI et les frais d'envoi.

MAIF: 108,78€.

Achat d'un vidéoprojecteur: 389,89€.

Le reversement des adhésions à SAT-Amikaro représente 157,50€.

Le solde du Livret A s'élève à 4708,57€

Les membres ayant réglé leur cotisation en 2017 sont au nombre de 20.

Le rapport financier est approuvé à l'unanimité.

3/ Projektoj

Marcelo prezentas la projekton pri Kajto kaj tiun pri la jubilea festo por la kvindekjariĝo de Esperanto-Gironde.

Kajto-projekto konkretiĝos: la kvaropo venos speciale de la 2a ĝis la 5a de majo 2018. Ili esperas koncerti la 1an de majo en Grésillon.

Plano:

- merkredon, la 2an: koncerto en Cenon

- sabaton la 5an: koncerto en Cambes

Per tio ni povos enspezi sufiĉan monon por pagi la vojaĝkostojn de Kajto.

Ni povus komuniki pri Kajto kaj pri la jubilea festo de Espéranto-Gironde. Oficiale, la asocio datumas de la jaroj 60-aj, eble 1964. La unua prezidanto estis Yves Peraud, kiu loĝis rue Blanqui, en Cenon.

Estus oportune ĉiokaze paroli pri Esperanto en Bordoza kaj Ĝirondio. Tiu projekto bezonas la aprobon kaj kunhelpon de ĉiuj.

La kondiĉoj en Cenon estos favoraj: la urbo partoprenas en la kostoj per subvencio kaj senpaga salono (Simone Signoret).

Koncerne la feston mem: ni devas logi la esperantistojn lokajn kaj eksterajn; do Marcelo proponis al SAT-Amikaro organizi sian ĝeneralan asembleon de 2018 en Cenon (la propono temas ja pri ĝenerala asembleo, ne pri kongreso). Marcelo jam kontaktis al Serge Sire ĉiteme.

La loko povus esti le Château du Diable, kie, en 1966, la unua grupo de Esperanto en Ĝirondio akceptis SAT-Amikaran kongreson. Ĝi situas en Cenon, 88 cours Victor Hugo, kontraŭ la klifo.

La problemo estas, ke ne estas loĝebleco en tiu loko.

Ni povus starigi allogan programon por logi kvindekon / sesdekon da esperantistoj, eĉ se la datoj ne estas tre oportunaj por multaj, ĉar ne estas feritagoj.

Pri buĝeto: ĉio estas senpaga, nur estos pagendaj la vojaĝkostojn (nur pri veturo, ne reveturo): 1300€. La urbo Cenon subvencias per 1200€.

Eble ni povos eldoni memorlibreton.

La projekto estos pli precize prezentata post la manĝo.



Le Château du Diable, à Cenon

4/ Diversaj demandoj

(1) Morine a rencontré le maire de Créon, qui est favorable à l'idée de prêter une salle municipale et aider le groupe espéranto, à condition qu'il s'agisse d'une association de Créon. Il a suggéré de créer à Créon une antenne d'Espéranto-Gironde.

Il suffit d'un document émanant du conseil d'administration d'Espéranto-Gironde, actant la création d'une antenne à Créon. Le maire pourra alors mettre une salle à disposition quand ce sera nécessaire, et accepter le groupe au forum des associations en septembre. Il a par ailleurs incité à inscrire l'activité espéranto dans les TAP.

Janine propose la création d'une antenne à Montendre.

Décisions :

L'assemblée générale décide la création d'une antenne d'Espéranto-Gironde à Créon (33670).

L'assemblée générale décide la création d'une antenne d'Espéranto-Gironde à Montendre (17130).

La responsable de l'antenne de Créon est Morine Stride.

La responsable de l'antenne de Montendre est Janine Dumoulin

Joël : Il n'est pas utile d'en créer une à Galgon, car une association existe déjà, Espéranto Galgon, créée par Jean-Claude Bot; de même pour Libourne. Par ailleurs l'association Espéranto Libourne est devenue Espéranto en Libournais. Il est prévu de créer un événement pour se faire connaître (animation, ouverture d'un cours...).

Jean-Seb suggère qu'un résumé des démarches à effectuer pour la création d'une antenne soit publié dans LEGI.

(2) Morine rappelle que lors de l'intervention à l'université le 12 avril, est apparu le besoin de matériel publicitaire.

Propositions :

- Drapeau 2,20 m x 0,55 m + mât télescopique (2,90 m) + socle + housse de rangement : 180€ TTC, chez Bruno Dion, entrepreneur de Créon.

- T-shirt avec impression logo Espéranto-Gironde (4 couleurs) (Bruno Dion):

- Coton 150 g, petit logo sur le cœur : 50 pièces = 644,40€
impression cœur et dos : 823,20€

- Coton 185g : cœur : 814,80€
cœur et dos : 999,60€

- T-shirt avec impression logo Espéranto-Gironde en 4 couleurs (Adler, par internet) : T-shirt blanc, ras du cou, marque B & C (185 g)



Après discussion concernant d'éventuelles inscriptions complémentaires au dos, on s'accorde sur une simple inscription discrète (logo) cœur.

Morine est prête à poursuivre la recherche d'imprimeurs pour avoir d'autres tarifs. Accord de l'assemblée générale.

Bernard V. suggère aussi un logo à thermocoller sur un T-shirt blanc, facile d'utilisation et peu coûteux. On constate que les T-shirts proposés par Adler sont à un prix très avantageux.

Claudine : les T-shirts pourraient être vendus à l'occasion de la fête de mai.

Peio : Il faudrait que les T-shirts soient proposés en 3 tailles.

Problème : où le drapeau, qui sera livré chez Morine, sera-t-il entreposé ? Il est trop encombrant pour les armoires à Cenon.

Elvezio propose de le mettre dans son bureau à l'université.

Bernard V : Un problème va se poser au moment des forums des associations : le drapeau ne pourra pas être partout à la fois.

Vote pour l'achat du drapeau : approuvé à l'unanimité

Jean-Seb propose de faire circuler entre les antennes les revues arrivant à Cenon d'autres associations espérantistes.

Morine commencera les cours d'espéranto à Créon plus tard : projet de présentation de l'espéranto en français auprès du groupe jungien (à partir du livre de Piron). Par ailleurs, la conférence musicale va être traduite en espéranto (au cours des rencontres du lundi après-midi à Cenon).

(3) Cotisations : doivent-elles rester au même tarif ? augmenter ?

Morine propose qu'on les laisse au même tarif et que l'on soutienne l'association par un don, en arrondissant le total.

Vote sur le tarif des adhésions :
La proposition de Morine est acceptée à l'unanimité.
Pas d'augmentation de tarif pour 2018.

(4) Demande concernant le projet Brel : Marcelo

Jusqu'où Espéranto-Gironde peut-elle aider à ce projet ?

Fabrice a précisé que les associations qui donneront 300€ auront leur logo sur la pochette du CD. Les Kompanoj étant une émanation d'Espéranto-Gironde, il serait bon que le logo d'Espéranto-Gironde apparaisse.

Le CD comportera 14 chansons ; *La Strebo* ne pourra pas en faire partie : les droits appartiennent à une compagnie états-unienne qui refuse de les céder.

Propositions :

- subventionner le CD à hauteur de 300€, pour que le logo apparaisse
- souscrire pour 200€ de CD.

Ces deux propositions sont acceptées à l'unanimité.

Les disques seront revendus au prix de 15€. Ils seront en vente en janvier.

(5) I-Kurso

Marcelo et Claudine se sont portés volontaires comme correcteurs depuis septembre. Axel Rousseau a envoyé une liste d'une trentaine de personnes de Gironde qui ont un jour suivi ce cours.

Claudine suggère d'envoyer un message à ces personnes pour les informer que des cours existent dans leur région (Cenon et antennes), ainsi que des manifestations :

Responsables selon les secteurs :

- Bernard Vidal : Bassin d'Arcachon
- Elvezio : université

Morine : Créon

Joël : Galgon, Libourne

Jean-Seb : Pessac

Janine se charge d'envoyer un message d'information à ces adresses.

Claudine informe que M. et Mme Légglise doivent rapporter des documents et des livres. Ils doivent prendre contact avec Jean-Seb ou Elvezio. Pas de nouvelles pour l'instant.

Joël informe que le Mouvement Européen France 33, qui a pour objectif de défendre l'idée européenne, organise régulièrement des conférences débats à Bordeaux, où il pourrait être intéressant d'intervenir pour évoquer la question des langues.

Le prochain débat aura lieu le 18 octobre à l'Institut Goethe, 35 cours de Verdun. Thème : Quelle relance pour l'Europe ?

D'autre part, à Sciences Po, les 19 et 20 octobre, auront lieu les journées Eurotémis.

Après une vive discussion sur l'Europe, **Morine** propose qu'un petit groupe assiste à la conférence du 18.

Elvezio en informera ses étudiants d'espéranto.

Par ailleurs, Christian Lavarenne présentera une conférence sur Zamenhof le 22 novembre, au centre Yavné (centre culturel juif), rue Molière (derrière l'Athénée municipal). Il faudra apporter quelques brochures sur l'Espéranto. Elvezio y assistera.



Christian Lavarenne

(6) Les cours

- A l'université :

Elvezio : Les cours ont commencé début octobre et ont lieu le mardi de 17h30 à 19h30, salle A2-107 : salle d'environ 20 places, qui était pleine lors de la séance de découverte. Dix-sept personnes étaient présentes (en dehors de Jean-Seb et Bernard) dont 4 anciens. L'information a été envoyée à tous les étudiants et collègues. Une professeure de japonais est intéressée ; il y aura une douzaine de débutants. Jean-Seb prendra les 4 anciens dans une salle voisine pour travailler les leçons suivantes.

Il s'agit encore d'un enseignement hors-cursus, mais la directrice adjointe est favorable à un enseignement dans le cadre de l'université. L'espéranto apparaîtra donc l'année prochaine dans le panel des langues enseignées à l'université.

D'autre part, à la suite du rangement des armoires à Cenon, des ouvrages ont été proposés aux bibliothèques de langues et acceptés, classés dans un rayon spécifique Espéranto (35 fiches). On peut aussi commander d'autres ouvrages pour ajouter à ceux existants.

Peu d'universités en France ont reconnu jusqu'à maintenant l'espéranto : Aix (Duc-Goninaz) ; Clermont (Jeanton) ; ENS (Jespersen).

- Autres cours :
- Gujan Mestras : vendredi après-midi, de 14h30 à 16h30, salle de formation
- Pour tous les autres cours : pas de changement

5/ Renovigo de la estraro

Le Conseil d'administration se compose d'Elvezio Canonica, Janine Dumoulin, Monique Dussenty, Morine Stride.

Jean-Seb présente sa candidature. **Elu à l'unanimité.**

Composition du Conseil d'administration :

Elvezio Canonica, Janine Dumoulin, Monique Dussenty, Morine Stride, Jean-Sébastien Brilleaud.

Composition du bureau : pas de changement :

Président : Elvezio Canonica

Trésorière : Morine Stride

Secrétaire : Janine Dumoulin

L'assemblée générale se termine à 13h55.

Janine



Kiel kutime, grandioza kunmanĝo!

ESPERANTO-GIRONDE
PROJET POUR LES CINQUANTE ANS
DIMANCHE 8 OCTOBRE 2017

KVINDEKJARA FESTO DE ESPERANTO-GIRONDE
(suite de l'assemblée générale)

Présentation du projet par **Marcelo** :

Comme depuis la fin du printemps son emploi du temps professionnel lui permet de disposer d'un peu de temps, Marcelo s'est rapproché de ses activités syndicales et espérantistes.



A Pâques, lors du congrès de SAT-Amikaro à Nantes, il est apparu qu'aucun groupe n'était disposé à organiser le congrès 2018. L'assemblée générale d'Espéranto-Gironde n'a pas eu lieu en septembre comme prévu, mais Marcelo a quand même proposé à SAT-Amikaro une invitation à l'occasion de la venue de Kajto à partir du 2 mai 2018.

Marcelo projette le projet sur écran.

Le Château du Diable, à Cenon, pourrait accueillir l'assemblée générale de SAT-Amikaro, et des animations. Il dispose d'une vaste salle des fêtes (qui pourrait être partagée en plusieurs espaces). Il ne dispose pas d'hébergement.

La directrice culturelle de Cenon a donné son accord pour un concert ou un apéro-concert le 2 mai : subvention de 1200€ (1400€, si apéro-concert).

L'année 2018 sera le 30^{ème} anniversaire du premier disque de Kajto en espéranto.

Kajto propose de donner trois concerts : ils peuvent jouer le 4 et le 5, ou peuvent animer un atelier chant et danses traditionnelles.

Autres animations :

- Kiam naturo... (fiches sur les fleurs avec activités, jeux etc.) : il existe déjà 250 fleurs identifiées. (Une nouvelle rubrique paraît dans La SAGO : Florbukedo.) + promenade à pied avec Monique.

- Les mascarons et promenade à pied dans Bordeaux sur ce thème.
- Film Espéranto : peut être projeté cette semaine-là ou la précédente.
- Exposition d'archives avec l'aide de professionnels de la médiathèque.
- Conférence musicale : condensé des deux présentées à Montendre (il faut vérifier l'acoustique de la salle).

Calendrier :

- mercredi 2 mai : concert (salle Simone Signoret)
- jeudi 3 mai : Bourse du travail : visite et rencontre avec des syndicalistes locaux (CGT + Sud Solidaires) ; formation syndicale ; présentation de la langue et mini-cours de langue (30 minutes).

Fin de la journée vers 16h.

Conférence musicale à la chapelle du CROUS (ou nouvelle maison de quartier : Marché des Douves)

Jean-Seb propose une visite du nouveau Bordeaux.

Marcelo doit prendre à nouveau contact avec Serge Sire pour l'AG de SAT-Amikaro.

Ces propositions sont approuvées à l'unanimité.

Morine propose de s'occuper des repas : organisation, lieux...)

Transports :

- Depuis la gare de Bordeaux, prendre le tram jusqu'à la mairie de Cenon, puis le bus jusqu'au Château du Diable.

Espéranto-Gironde prendra une carte TBM collective seulement pour la visite organisée.

Claudine propose de fabriquer des sacs avec l'atelier couture, à partir de tissus de récupération.

Bernard V. suggère de fixer des logos thermocollants sur les sacs.

Il faut quelqu'un pour se charger des relations extérieures : officiels de la mairie, maire : **Elvezio** ?

Marcelo se charge du service culture et communication et de la communication en espéranto.

Bernard S. se chargera-t-il des contacts avec la presse ?

Morine se charge de la communication avec TV7 (Yves Simone).

Bernard S. et **Marcelo** se chargent de la communication avec les syndicats (CGT et Sud Solidaires).

Bulletins d'adhésion :

Doivent-ils être bilingues ? Il faut le montant de la participation, le prix des repas. Tout cela devra paraître au plus tard dans la revue de janvier ; donc il faut avoir les informations début décembre.

Monique propose de relancer les fiches touristiques et de mettre dans les pochettes celles de Bordeaux.

Site d'Espéranto-Gironde :

Morine propose le nom de domaine esperanto-gironde.fr. Elle peut rattacher son blog au site. Le site sera très utile pour faire la promotion de l'événement. Le coût annuel est de 29€ par an.

La prochaine réunion d'Espéranto-Gironde aura lieu le **19 novembre** si possible au Château du Diable, sinon à Créon.

Janine



NIAJ KURSOJ

- A **GUJAN-MESTRAS**, le vendredi de 14h30 à 16h30, cours pour débutants, au local attenant au bureau de poste de la Hume, salle de formation, 43 avenue du Maréchal de Lattre de Tassigny 33470 Gujan-Mestras. (06 95 02 85 00)
- A **CREON**, le jeudi tous les 15 jours de 14h à 16h, cours pour débutants chez Morine STRIDE, 17 rue Voltaire. (06 10 07 08 58)
- En **GALGON**, çiu mardon de la 17a ĝis la 19a, Joël LAJUS gvidas kurson por komencantoj kaj progresantoj. (05 57 69 26 96)
- En **CENON** (Kastelo Palmer), çiu lundon inter la 14a kaj la 17a, Marcelo REDOULEZ animas tradukgrupon kaj Claudine POMIROL kurson por komencantoj. (05 56 21 38 64)
- En **MONTENDRE**, çiu mardon de la 10a ĝis la 12a, Janine DUMOULIN gvidas kurson por çiuj niveloj. (05 46 49 45 18)
- En **UNIVERSITATO BORDEAUX MONTAIGNE**, en salono A2-107, çiu mardon de la 17a30 ĝis la 19a, kursojn gvidas Elvezio kaj Jean-Seb. (06 72 17 22 97)

KONTRAŬ NUKLEAJ ARMILOJ LETERO AL LA PREZIDENTO



Estimata Samideano,

Post pluraj monatoj da traktadoj ĉe la sidejo de UNO en Novjorko, la sepan de julio 2017, la reprezentantoj de 122 ŝtatoj aprobis la "Traktaton pri la malpermeso de nukleaj armiloj". 193 ŝtatoj estas membroj de UNO. Dum la aprobo de la Traktato, Singapuro sin detenis kaj Nederlando kontraŭis. Pluraj ŝtatoj ne partoprenis en la baloto.

Inter la landoj de Eŭropa Unio, nur la reprezentantoj de Aŭstrio, Irlando, Kipro, Malto kaj Svedio aprobis la projekton de la Traktato.

Vi trovos, kunligita al tiu numero de LEGL, la Traktaton tradukitan en Esperanton. En tiu Traktato, **du artikoloj estas tre gravaj** : la **unua artikolo** pri la malpermesoj kaj la **dek kvina artikolo**, kiu indikas kiam la Traktato validiĝas.

La subskriboj de tiu Traktato komenciĝos, ĉe la sidejo de UNO en Novjorko, la 20-an de septembro 2017. **Ĉiuj ŝtatoj** estas invitataj por subskribi ĝin.

Vi konas la danĝeron de la nuklea armilo por la Homaro. Ankaŭ ni opinias ke, estiĉi civitano, vi povus skribi al via registaro por ke via lando subskribu kaj ratifu tiun Traktaton.

Ni sendas hodiaŭ leteron al la Prezidento de la franca Respubliko por peti ke nia lando subskribu kaj ratifu tiun Traktaton.

Bonvole akcepti, Estimata Samideano, niajn amikajn kaj pacistajn salutojn.

Colette Weiss kaj André Weiss

Colette kaj André Weiss estas pacamaj esperantistoj loĝantaj sude de nia regiono (dep. 64). Ili diligente kaj obstine de multaj jaroj laboradas kontraŭ militoj. Aparte viglas ilia agado kontraŭ nukleaj armiloj. Jen ili dum la SAT-kongreso en Jalto (2012).



Ĉu konvinkitaj ankaŭ vi sendos hodiaŭ leteron al la franca Prezidento ?



TIMIANO

Kiu ne konas timianon, tiun plurjaran planton kun etaj violkoloraj floroj, devenan el mediteranea baseno, ege ŝatatan de antikveco?

Ĉiuj konas la ordinaran timianon (*thymus vulgaris*), kiun ni kreskigas en niaj ĝardenoj aŭ en poto sur la rando de la fenestro. Sovaĝa timiano, aŭ serpilo (*thymus serpyllum*), siaflanke kreskas sur sunaj talusoj, en ŝtonhavaj lokoj, kie grundo resendadas fortan varmecon. Ambaŭ havas similan terapian efikon.

Mi tamen iel nuancu: mi preferas serpilon en miaj infuzaĵoj pro ĝia delikata parfumo. Ordinara timiano pli bone aromigas miajn preparitajn pladojn.

Serpilon oni tradicie uzas per buŝa vojo ĉe plenkreskuloj kaj infanoj por kuraci spirajn vojojn, bronkan obstrukcon, kaj eĉ kokluŝon.

Ĝin oni uzas ankaŭ okaze de tiaj digestaj perturboj, kiaj ventra ŝveleco, ruktoj, intestaj gasoj, kaj stomakaj kramfoj. Ĝi efikas tiom per interna, kiom per ekstera uzo.

Timiano havas kontraŭinflaman, kontraŭspasman, kontraŭmikroban, kaj kontraŭoksidan efikojn.

Interna uzo

- Infuzaĵo: por unutaga kuracado, infuzu po 3 ĝis 8 gramojn por 1/4 ĝis 1/2 litro da akvo, kaj ĝin po-trione trinku.

- Spicado: plenu, ne premante, botelon per florspikoj plukitaj sub la mediteranea suno. Kovri per malvarmpremita olivoleo ĝis 3 centimetroj super la floroj. Ripozigu dum 14 tagoj sub la suno aŭ apud forno.



Ekstera uzo

- Kelkaj gutoj da esenca oleo de tujanola timiano (*Thymus thujanoliferum*) sur kapkuseno mildigas noktan tuson.
- Apliku 3 gutojn da tiu esenca oleo miksitajn kun 1/2 kulerpleno da oleo sur la stomako.
- Bano: Okaze de iritado, troekcitiĝo, deprimio, Maria Treben rekomendas kompletan banon. Maceru 200 gramojn da sekigita timiano en 6 ĝis 8 litroj da freŝa akvo dum tuta nokto. La sekvan tagon, varmigu tiun kvanton kaj ĝin verŝu en la banakvon. La bano daŭru 20 minutojn. La areo de la koro estu ekster la akvo. Ne sekigu vin post la bano, sed kuŝu dum unu horo por ŝviti, kovrita per tualettuko aŭ banmantelo.

«Kiu matene trinkas tason da infuzaĵo de serpilo anstataŭ la kutima kafo, tiu tre rapide sentos ĝian bonfaran efikon: klarvidan menson, sanan stomakon, nenium plu matenan tuson kaj ĝeneralan senton de bonstato.» (Hildegarde von Bingen)

Morine

Fontoj:

Maria Treben, *La santé à la pharmacie du bon dieu*, Ed. Ennstahler Steyr

Jacques Fleurentin, *Du bon usage des plantes qui soignent*, Ed. Ouest-France



Serpilo



Timiano: la plej bona natura antiseptaĵo



EL LA ARKIVO DE CGT SINDIKATO (ELFOSITA DE BERNARDO)

CONGRES NATIONAL ORDINAIRE DE LA CGTU - 18-24 SEPTEMBRE 1927

CINQUIÈME JOURNÉE

437

se faire l'illusion que du jour au lendemain nous allons recruter des millions de syndiqués.

Il y aura encore, après l'institution de la caisse, tout un travail de recrutement à opérer, toute une agitation à faire, toute une bataille sociale à mener, car c'est cela seulement qui amènera à la C.G.T.U. la confiance de l'ensemble du prolétariat (*applaudissements*).

LE PRÉSIDENT. — La discussion étant close, je donne connaissance d'un vœu du syndicat du Bâtiment de la 9^e Région, tendant à ce que les réservistes soient considérés comme chômeurs par la caisse nationale.

(*Ce vœu est renvoyé à la commission.*)

MOTION EN FAVEUR DE L'ESPERANTO

LE PRÉSIDENT. — J'ai à donner au congrès connaissance de la motion suivante :

A l'heure où la rationalisation capitaliste accumule les dangers de guerre, les travailleurs du monde entier éprouvent l'impérieuse nécessité de ne plus former qu'un bloc révolutionnaire.

Mais la diversité des langues nationales est un grave obstacle à la réalisation de cette union fraternelle des peuples.

Les espérantistes révolutionnaires participant aux travaux du congrès de Bordeaux :

Rappelant tout d'abord que l'Espéranto, langue universelle d'étude très facile, est déjà largement connu grâce aux congrès internationaux ouvriers de Cassel, de Francfort, de Vienne (1925), de Leningrad (1926), de Lyon (1927);

Rappelant, en outre, que l'étude de cette langue fut recommandée par le congrès de la C.G.T. en 1920 et que seul, à ce jour, le gouvernement des Soviets participe à sa diffusion ;

Demandant qu'à côté de la tâche de revendications immédiates, la C.G.T.U. préconise, au sein des masses ouvrières, l'étude de l'Espéranto qui, en brisant la frontière des langues nationales, unifiera et secondera la révolution internationale.

Nous sommes certainement d'accord sur cette résolution. Je la mets aux voix.

(*La résolution est adoptée.*)



KANZONO ŜTORMVETERO

Tradukita de Roger Bernard el usona *Stormy Weather* (france *Nostalgie*)

A
Kial do en ĉiel' ne brilas sun', ŝtormvetero,
Nun ke solas mi sen espero,
Pluvas, pluvas senĉese.
Nuda viv', trista kaj mizera viv', ŝtormvetero;
Ne retrovi sin, jen infero,
Laca mi nun senĉese.

B
De lia forir' deprimu tuj min tuŝas;
Se li restos for, mi en rulseĝ' min puŝas.
Al la Di-Sinjor' mi preĝas kaj rifuĝas,
Por paŝi plu ĉe la sun'.
Ho! dolor'! ĉiu mia hav' nun for, ŝtormvetero,
Nun ke solas mi sen espero,
Pluvas, pluvas senĉese.

(ree de A ĝis B)

Noto de la tradukinto:

Kiam venis al mi la deziro traduki tiun usonan kanton, laŭ kies melodio mi multe dancis antaŭ la milito, mi aĉetis la partituron en Parizo. Kiel strange! La unua verso en la angla estis:

Mi ne scias, kial ne plu estas suno en la ĉielo...

Kaj la unua verso en la tiel nomata franca « adapto » jen tekstis:

Kiam mi prenas mian transistoron...

Kaj iel same en la cetero!

Nekredeble tamen jes! Mi tradukis el la angla, kaj, mi kredas, multe pli fidele.

El «*Francaj kanzonoj malnovaj kaj modernaj*» G. Waringhien kaj R. Bernard Iltis-Eldonejo 1990 p.109



Se vi deziras (re)aŭskulti kaj provi kunkanti la originalan version, Marcelo konsilas spekti tiun belan prezenton kun voĉo de Etta James:

https://www.youtube.com/watch?v=et7SReenr_s



Kiel la laika Frato ne malligis la hundojn.

Sed, kiel kroma danĝero, malproksimiĝante de Paruino por reeniri la arbareton, Renardo trovas sin fronte al unu el tiuj duon-kampanoj, duon-lakeoj kiuj, pro karitato aŭ ajna ŝuldo, ricevis favoron vivteni sin dank'al la monaĥoj kiujn ili servis aŭ kies bienojn kaj ĝardenojn ili gardis. Oni nomis ilin laikaj fratoj; malalte estimataj homoj, kiuj malofte meritis pli bonan konsideron.


Tiu-ĉi devis teni per rimeno du apro- aŭ lepor-hundojn. Baldaŭ la unua lakeo kiu ekvidas Renardon laŭtkrias al li:

- Malligu! Malligu!

Renardo komprenas la danĝeron; anstataŭ provi ne plu eblan eskapon, li rezolute alpaŝas al la laika frato kiu alparolas al li:

- Aĥ! aĉa besto, jen via fino.

- Moŝto monaĥo, vi nepre ne misjuĝu; de neniu vi forprenas lian rajton. Ĉu vi ne vidas ke la aliaj hundoj kaj mi vetkuras? Gajnos la unua kiu atingos la celon. Se vi ellasas la du aprohundojn ili malebligos al mi konkursi por la premio, pro tio vi estos tute mallaŭdata.



La laika frato, nature mense simpla homo, pripensis, gratis al si la frunton.

- Per Nia Sinjorino, diras li al si, mastro Renardo eble pravas.

Do li ne ellasis la hundojn kaj nur bondeziris bonŝancon al Renardo.

Tiu-ĉi, tiam rapidiĝante, enŝovas sin en vepron kaj, plu persekutata, haste kuras tra ebenaĵo kiun finlumis larĝa fosaĵo. La fosaĵo estas siavice transpasita kaj la hundoj, post tempo de hezito, perdas liajn spurojn kaj reiras.

Sekure for de iliaj kruelaj dentoj, Renardo povis rekvietiĝi. Li estis elĉerpita, sed li trompvenkis siajn malamikojn. Kaj, kvankam kelkaj ripozhoroj ne satigis lin, ili almenaŭ redonis al li lian lertecon kaj lian tutan ardon por ĉasado kaj marodo.

FINO



Desegnis Morin'



ESPERANTO KURSOJ EN LA UNIVERSITATO

Université Bordeaux Montaigne | Web TV | Annuaire | e-shop

15

Rechercher

Mon compte

Infos pratiques | Culture et vie étudiante | Études & scolarité | Orientation & Insertion | International | Vie scientifique

Toute l'actualité

Accueil / Toute l'actualité / Formations / Initiation à l'Espéranto

pdf | Imprimer | Partager

Découvrez l'Espéranto à l'Université Bordeaux Montaigne

Initiation

- Services numériques
- Examens
- Vie pratique
- Scolarité
- Formations
 - Soutien financier pour valoriser vos diplômes
 - Atelier de calligraphie arabe
 - Réunion d'information et présentation des 4 certifications
 - Action de Formation Personnelle en Langue Française Appliquée
 - Initiation à l'Espéranto
 - Certification "Sensibilisation à l'entrepreneuriat"
 - Compétences transversales en licence : de quoi s'agit-il ?
 - Workshop "Arriver là et en faire quelque chose"
- Documentation



ESTRARO
de
«ESPÉRANTO-GIRONDE »

* * * * *

Centre Culturel Château Palmer
33150 CENON
Banque Postale:
347771 F Bordeaux



* * * * *

Prezidanto: **Elvezio CANONICA**
Rés. Du Prince Noir Bât.D Appt.315
Avenue Sainte-Marie
33400 TALENCE

Tel: 06 72 17 22 97 / canonica.elvezio@orange.fr

Sekretariino: **Janine DUMOULIN**
2, chemin des Nauves
Chardes 17130 MONTENDRE
Tel: 05 46 49 45 18 / janinedum@neuf.fr

Kasistino: **Morine STRIDE**
17 rue Voltaire
33670 CREON
Tel: 06 10 07 08 58 / morinestride@gmail.com

* * * * *

Materialon por LEGI bv. sendi al janinedum@neuf.fr
aŭ al Yannick DUMOULIN: yannickdum@free.fr

